

Frua Patristiko¹

‘stas teologio

... poezio

proverbas ke
‘postfike tristas animalo’

ja al la homo
hastanta de ĝuo al ĝu’
sen inhibo
sen limo

fine ĉio eknaŭzas:

ĉu tio la vivo?
ĉu vere ‘stas ĉio?’
ĉu por tio ni vivas surtere?

sed

kaŝiĝas
preterkapte sentiĝas
la mistero

vortoj mankas
esprimoj lamas
lingvo ne taŭgas

¹ La Latina vorto *persona* = masko.

ĉu diri: ‘la dio’?

sed ja nepre ne

la konataj

la falsaj

la mis- !

ĉi-tere dio misteras

ne sekvas ĉi-terajn regulojn

kutimojn preferojn

la dio mis-teras

sin tenas kaŝita

sed ties *maskon* ni vidis,

la maskon rekonis:

jen liberiĝas virin’

jen ekvivas la sklavo

jen ne posedo plu ĉefas:

jen la di’ ...

‘stas teologio

... poezio

sin montras

masko

post masko

post mask’

ne kapteblas la mistero
nur maskojn ni vidas:

la praforto kreanta,
l' origino
la parolo nin defia

homiĝinta en hom' senhonora
en homo sklave mortigita

krucumita
ĝisnaŭze malhomiĝe
eĉ en tia fora anguleto
la brizo
disblovanta niajn konceptojn
niajn ideojn
atendojn
bildojn

viroj inoj
niaj ne-niaj

'stas teologio

... poezio

eraras, kiu tion kredas kredenda!

Saluton ho oldaj Dioj...

Ho kie vi estas? Izisa, Anat kaj Dagon',
ho Oziriso, Moloh', vi Enurestu,
vi Amon-Râ kaj Baal, Saturno, Engurra,
U-dimmer-an-kia, ho moŝto Tammuz,
Odin kaj Hadad kaj ja ĉiuj ceteraj:
ja kie, ho kie vi estas, Dioj malnovaj?
Dum miloj kaj miloj da jaroj la homoj ŝvitadis,
baraktis, skulptis, adoris, homoj konstruis.

Ili vin amis – aŭ timis

 aŭ timis kaj amis samtempe
en strange komplika hom-paradokso.
Miloj da pastroj, eŭnuoj, birdrigardantoj,
miloj da ĉefepiskopoj, profetoj, sorĉistoj,
miloj da sanktuloj, piuloj, timemaj gejunuloj
oferis sian vivon unikan
esperis,

 ke pro ĉi ofero

 la ter' renaskiĝos

 revenos la sun' post eklipso

 denove inundos la grundon Nilo fertile

 la luno revenos

la tajdo refluos

Kie vi estas? Kie vi restis?

Kie do estas

 la tombejo de Dioj

 ne plu uzataj?

sentitole

kion mi vidas
kion mi palpas
kion mi propraorele perceptas
ĉio ĉi pasos

kion mi fidas
kion intuas
kion mi kiel realon akceptas
ĉio ĉi pasos

foje etoson reveman estigas
foje meditan foje ĉagrenan

sed

ĉio burĝonas
ĉio miraklas
vivi ja estas mirinde
sed ĉio ĉi pasos

la homo sian estonton sur tero
kaj planojn aspirojn kaj plu
la homo ja sian idaron
la nepojn nepinojn kaj plu
la hom' ĉie spurojn surtere
artverkojn atingojn rekordojn
sed same rubaĵojn balaston

la homo estigas

estigas
kaj plu

kaj

ĉio ĉi pasos

kun sama persist'
cedas la spacon al novaj esperoj
al novaj ekprovoj
al nova ekviv'

belas la vivo mirakla!